De kelkaj jaroj ekzistas disdivido de la taskoj ene de la estraro kaj komitato. Do eblas antaŭvidi eŭkan laboron pri la sekvaj punktoj: mi nur ripetos ion, kion mi jam diris antaŭe, sed intence mi komencis per la unuopuloj kaj la grupoj, ĉar nur dank' al la laboro de ĉiu inter vi eblas havi konkretajn rezultojn surloke; la federaciaj komitato kaj estraro nur povas instigi al difinita tasko, kunordigi laboron kaj eventuale, estonte helpi per monkontribuo iun interesan entreprenon.

Nu, Ĉu nia federacio kunvenas la eŭropaj asembleoj, krome aliaj eŭropaj landoj tre proksimas. Ĉu ne estus logike, ke ni iĝu loka helpanto de la agado de U.E.A. sur tiu tereno?

Kadre de U.F.E. ni jam streĉe laboris sur la kampo de edukado (informado de instancoj, kursoj en lernejoj, listigado de tiaj kursoj, ktp...). Mi proponas daŭrigon de tiu agado kun paŝo pluen: ni jam cerbumu pri seminario por esperanto-instruistoj (kiel ni jam organizis antaŭ du jaroj), sed ĉi-foje en iu C.R.D.P. (Centre Régional de Documentation Pédagogique), kun la helpo de oficiala eduka instanco kaj malfermo al la "ne-verda" instruistaro.

Kaj nun propono por 1986:

Spontane sin proponis Fraŭlino kaj Sinjorino ROUX por organizi la U.F.E.-kongreson de 1986 en tre bela kadro: en Gérardmer. Nur en 1986, sed jam ĉi-ŝatune ni devus esplori, por ke estiĝu esperanto-vivo en tiu ĉarma voĝeza urbeto.

Kompreneble la estraro kaj la komitato ankaŭ estu je la dispono de la grupoj kaj unuopuloj, kiuj bezonas konsilojn.

Finfine mi turnu min al niaj instruantoj, kiuj tutevidente konstante laboras por nia federacio. Denove temas pri konkreta propono: ne plu instruu senpage, petu almenaŭ kotizon por membrigo al nia federacio kaj abono al la "Informilo". Ĉiu nova aliĝo estas fortigo de nia federacio kaj eta monkontribuo por plua reklamado.

Memoru: nur se ni multnombros, oni aŭskultos nin!

Dum la nuna lernojaro (1983/84) funkciis en nia Federacio esperanto-kursoj en 7 lernejoj kaj liceoj. En la tuta Francio UFE sukcesis listigi 31 tieajn kursojn (26 lastjare).

Kvankam ankoraŭ temas pri modesta nombro, necesas diri, ke ĝi estas sufiĉe impona, se oni konsideras la plej malfavorajn kondiĉojn de instruado (plejparte senpaga, laŭ ofte malfavora horaro). Tamen la situacio pliboniĝas: en DOMBASLE kaj MUNSTER tri profesoroj ricevis pagon, pro tio ke ili realigis tiel nomatan P.A.E. -*Projet d'Action Educative*-. Ankaŭ la projekton mem la servoj de la akademio subtenas finance -ekzemple 1500F por ekspozicio pri KOREA RESPUBLIKO en MUNSTER-.

Plie vidiĝas, ke iom post iom ankaŭ la "ne-verda" instruistaro akcetas la "fakton" E^o. Sed kio pri nia Ministro? En letero al Henri d'Attilio, conseiller régional de Provence-Côte-d'Azur, li plian fojon montras, ke li ne estas fidela al siaj promesoj pri instruado de E^o kiel elektebla fako. Tamen li deklaras:

"Je suis tout à fait disposé à étudier les conditions du développement de l'apprentissage de l'espéranto dans le cadre des activités périscolaires des établissements scolaires qui sont actuellement en nette croissance".

Kredu min, gekolegoj, U.F.E. ĉion faros, por ke li konkretigu tiujn promesojn. De du jaroj li scias pri la jam funkciantaj kursoj; li ankaŭ scias, ke GEE (Grupo de esperantistaj Edukistoj) nombras 200 membrojn. El tiuj 200, 23 loĝas en nia Federacio...

Karaj gekolegoj, ĉu vi vidas la piedvokon de la prezidanto? Sed antaŭe, vi profitu la somerajn feriojn por ripozi, vojaĝi kaj profiti esperanton... kaj en septembro... memoru tiujn liniojn!

E. LUDWIG

NIA PERKORESPONDA KURSO

Nun, de post septembro ni dissendis 64 komunikojn al la gazetaro pri nia kurso. Ni povis konstati la aperon de 40 el ili. La rezultoj daŭre lamas: nur 22 gelernantoj ĝis nun, el ĉirkaŭ 100 personoj, kiuj petis informojn. Do, ĉi-jare aliĝis ĉirkaŭ 1/5 el la informpetintoj (antaŭe 1/3) kaj necesas sendi preskaŭ 3 komunikojn por varbi unu lernanton! Tial estus bone, se ĉiu samideano sentus sin koncernata de la konstanta alvokado de nia prezidanto: ĉiu el ni varbu 1 lernanton ĉiujare por la PKK^o!

El la gelernantoj de la pasinta jaro, spa lernantino ĵus finlernis la kurson: S-in^o Michèle SEURAT, instruistino en GAYE (51120 SEZANNE) gvidita de S-r^o CROCHET. Si jam aliĝis al la 2a-grada kurso -6 finlernantoj el 7 aliĝis al la 2a-grada). El la nunjaraj gelernantoj atingas la kursfinon, F-in^o Sonia BERTIN (Mulhouse), gvidata de S-r^o GROSSMANN.

Projektoj por la venonta lernejo-jaro. Pere de la nova Racia Kurso ni atingis kelkajn bonegajn rezultojn. Tamen ĉiujare iu nombro da gelernantoj eĉ ne sendas unu taskon pere de tiu kurso, aŭ forlasas la lernadon post kelkaj lecionoj. Ekzemple lastjare 12 gelernantoj el 35 neniam sendis taskon, kaj ĉi-jare... 10 el 22! Tial, de kelkaj jaroj, S-r^o Ludwig kreis la "METODOJN 11 kaj 12" de U.F.E. Nun li preparis la adaptojn por uzi ilin perkoresponde. Temas pri 12 paĝoj suplementaj kun klarigoj, konsiloj, pliaj ekzercoj. ankaŭ la kasedo nun estas preta por M11 kaj baldaŭ por M12. Ekde la venonta ŭatuno nia kurso do funkcios per tiuj metodoj. La kotizo estos proksimume la sama kiel nun (la libro estos iom malpli kosta sed la kasedo iom pli kosta). la lernantoj, kiuj estos finlernintaj la kurson en la daŭro de 5 monatoj, povos aliĝi al la 2a-grada -per M^o12- aĉetante nur la libron sen plia kotizo. sed ĝis la someraj ferioj ni daŭre funkcios per la NRK^o.

J.P. COLNOT

LOKAJ RADIO-ELSENDOJ EN NANCY

La E^o-elsendo ĉe la loka radio "Graffiti-Bergamote" nun ĉesis post 8-semajna ekzisto. montriĝis neniu reago de la publiko, ĉu telefone, ĉu letere. Ni promesis rekontaktiĝo reciproke aŭtune. Tamen, prizorgado de unuhora programo, kiun oni proponis al ni (anstataŭ duonhoro dum la properiodo) postulas plurajn horojn da preparlaboro ĉiusemajne. Estus do necese starigi teamon de aktivuloj. La ĝenerala nivelo de tiu radio, kaj nakaŭ la potenco de ĝia elsendilo ne estis ĝis nun tre alta. Tamen, "Graffiti" nun, estas agnoskita, ĝi ricevos usbvencion, kiu ebligos plialtigi ĝian potencon (ĝi estos aŭdebla je 30 km); ĝi planas tutan kampanjon per afiŝoj, flugfolioj, ktp. en NANCY mem kaj en la ĉefa parto

13
de ĝia distrikto. La kunlaborantaj saocioj povos profiti ne nur la radion mem sed ankaŭ la apogan kampanjon. La Junuldomo "Lorraine" en VANDOEUVRE", kie situas la elsendilo, tute apogas la tutan aferon kaj pretas malfermi E^o-kurson. Do, jen afero pripensinda dum la venontaj monatoj. Mi aldonu, ke en tiu radio jam aktivas interalie la Portugaloj (ĝuste tiuj, kiuj dancis por ni dum nia lasta staĝo) kaj ankaŭ simpatia grupo de arabaj ĝejnuloj, kiuj havigis al si ŝajne jam vastan publikon en siaj propraj etnaj rondoj ĉirkaŭ NANCY.

LOKA ESPERANTO-VIVO

La 2 kursoj por komencantoj daŭre vigle funkcias kun respektive 3 kaj 5 gelernantoj. Kunveno okazis la 13an de januaro kun dekduo da partoprenantoj -S-r^o ETIENNE prelegis pri la verko de Schwartz "Kiel akvo de l'rivero"-, la 16an de marto -oni pritraktis la kantojn en E^o- kaj la 13an de aprilo -priparolado de la estonta agado- kun ĉiufoje deko da partoprenantoj.

BRUYERES

La enlicea kurso gvidata de S-r^o CLAUDEL finiĝas kun ok partoprenantoj (el dektri en oktobro). Pluraj el ili intencas plue studi la lingvon venontjare. Do verŝajne en oktobro 1984 stariĝos 2 kursoj, 1 unua-grada kaj 1 dua-grada, ambaŭ gvidotaj de S-r^o CLAUDEL.

BAR-le-DUC

Post la sukceso-plena Zamenhof-vespero (preparita de S-in^o DILLENCHNEIDER) kaj de la Internacia Karnavalo (sukceso, kiun ni ŝuldas grandparte al la paro Lydia BLOCH kaj Anne AMBLES, ŝia filino), mi proprainiciate aperigis komunikon en la gazeto, aranĝis inform-vesperon, malfermis kaj gvidis publikan kurson en ĉambro, kiun disponigis tiucele S-r^o GILBERT en Chambre de Commerce. Atingis la kurs-finon, "METODO 11", 2 junulinoj. La kurso planita en la liceo ne povis okazi. La SELIN-kampanjo normale disvolviĝis, ŝajne sen ia pozitiva rezulto. Mi aldonu, ke la grupo-vivo kvazaŭ ne plu ekzistas: la starigon de regula, monata kunveno por plani agadon aŭ tutsimple por riĉigi sian lingvo-scion la klubanoj(??) ne aprobis. Sekve, neniu scias, kion kiu faras! Memevidente neniu estas preta gvidi kurson, eĉ elementan. Persone, mi ne ŝatas agadi laŭ hazarda plano, tiom pli ke miaj ceteraj taskoj (regionaj kaj naciaj) iĝas tre tempo-rabaj. La klubanoj ne konscias, ke nur racia kaj komuna agado povas iĝi fruktodona. Mi taksas bedaŭrinda tiun sintenon.

P. DENIS

Lasta minuto: mi ĵus estis kontaktita por inform-vespero en la "ROTARY-CLUB".

MULHOUSE

Dank' al la klopodoj de S-in^o CHARTON la loka grupo de MULHOUSE povis havi budon ĉe la "Monda Festo", kiu okazis sur Place du 14 juillet, fine de februaro. Nia budo troviĝis ĝuste ĉe la enirejo de vasta halo, tiel ni povis informi multajn homojn pri E^o. Estis centoj da vizitantoj.

En la unua semajno de marto okazis ekspozicio pri E^o en CENTRE CULTURE & LOISIRS DES CO-TEAUX en Mulhouse, kaj nia samideano E. LUDWIG prizorgis inform-vesperon kun ĉeesto de dudeko da personoj. Malgraŭ tiu malgranda nombro da ĉeestantoj, ni sukcesis malfermi unua-gradan kurson kun 5 gelernantoj en ĉi-tiu sama kultur-centro. La kurson mi-mem gvidas per la "METODO 11" ĉiun vendredon vespere je la 20a horo. krome ĉiun mardon vespere kunvenas kelkajn grupanoj por paroli en E^o, por diskuti pri eventoj de la E^o-movado kaj por ludi per vorto-mozaiko.

A. GROSSMANN


SELESTAT Malfacile superebla la rekordo de nia kolego S-r^o GUEGUENIAT en la urba liceo! Dum la kuranta lernejo-jaro li ja inicias en E^o ... 56 gelernantojn, en la kadro de la 10% (procento eltirata leĝe el horaro dediĉata al franca kaj latina lingvoj). Eĉ se ĉiuj ne fariĝos praktikantoj, ili almenaŭ estos bone informitaj pri la fako Esperanto!

MUNSTER (Alzaco)

En septembro 1983; komence de la lerno-jaro, la anoj de la licea E^o-grupo de MUNSTER (Fr.-regiono ALZACO), decidis malkovrigi al la lernantaro la landon, kiun ili ekkonis de unu jaro per intensa legado de "La Espero el Koreujo". Dank' al la helpo de Korea E^o-Asocio, de la Korea Ambasado en PARIZO kaj de pluraj koreaj samideanoj, la esperantistaj lernejoj-kaj iliaj profesoroj starigis 18-panelan ekspozicion pri Koreujo, junio, en la halo de la liceo. Post la someraj ferioj, ĝi vojaĝos tra la mezlernejoj kaj liceoj de la regiono. Financan helpon disponigis la servoj de la Ministerio pri Edukado. Krome la klubanoj-registris kasedon, kie ili sone prezentas sian landon kaj sian regionon. Kopioj estas senditaj al Korea E^o-Asocio kaj helpintaj koreaj samideanoj.

40a internacia
junulara kongreso
13-20 julio 1984
Swanwick, Britio

karaj junaj
geamikoj



AUGSBURG
la Kongresurbo de la 70a
Universala Kongreso de Esperanto
1985
invitas vin



De la 16a ĝis la 18a de marto 1984, ĉirkaŭ 40 esperantistoj partoprenis renkontiĝon en BAR-le-DUC okaze de la urba karnavalo. Venis ĉefe Francoj kaj Germanoj sed ankaŭ Luksemburganoj, Nederlandano, Brito kaj Svedino partoprenis la renkontiĝon. La unuan vesperon, la vendredon, ni konatiĝis pere de ludoj poste sekvataj de kantoj. Sabatmatene ni komencis la preparadon de kostumoj por tuj poste porti ilin dum la promenado tra la urbo. Tiam ni klopodis averti la urbanojn pri la balo (vespere) kaj la karnavalo (dimanĉe). Nia esperanta grupo miksis sin kun la urbanoj dum la vespera maska balo.

Dimanĉe aktivaĵoj komenciĝis per ludoj antaŭ kirko. Ni ĉiuj estis pretaj, kostumitaj, maskitaj la posttagmezon por partopreni la karnavalon. La urbo estis bele ornamita kaj multaj urbanoj estis kostumitaj. Kun bela, giganta feino esperanta ni marŝis tra la urbo, bruante, dancante, kantante kaj frenezante.

Se vi kantas la melodion de "Frato Jakob!" kun la vortoj: *Karnavalo (bis), Bar-le-Duc (bis), Vivu Esperanto (bis), Zamenhof! (bis)*, vi jam estas preta por veni al la venonta karnavalo en BAR-le-DUC!


Berit Posthuma

PARTOPRENU...!! PARTOPRENU...!! PARTOPRENU!!...


- 30/6 - 1/7: Vizito de "alternativa" Parizo... Komunaj manĝoj, senpaga loĝado 100F nur! Aliĝilo rapida (eĉ telefone) al JEFO, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS. Tel.: (1) 278 68 86
- 2-5 / 7: Biciklado Parizo-Boulogne... sama aliĝ-adreso!
- 13-20/7: Internacia Kongreso de TEJO en SWANWICK (Britio), ankaŭ eblas tien biciklumi!
- 27-31/7: Internacia Junular-Renkontiĝo en VILLANDRAUT (proks. BORDEAUX) organiz. la Junulfako de SAT. Kontentigegegega... programo! 310F nur! Aliĝilo: Jean-Luc BERARD, 10, rue Maryse Bastié, Bât.C n°18 F-33300 BORDEAUX
- 12-19/8: Franc-Germana Semajno en LE HAVRE. Treege alloga programo! aliĝo apud JEFO (vidu supre).
- 20/8- 1/9: Biciklado tra Germana Demokrata Respubliko! Informas Roland Schindler, W. Pieck-Str. 44, DDR-2090 TEMPLIN

28 / 8-3/9 : **BICIKLADO AL LA LAGOJ DE PLITVICE** (unika fenomeno: 16 lagoj ligitaj per akvofaloj, en nacia parko, sub protekto de UNESCO); divido de manĝkostoj; neniu kotizo; aliĝo ĉe Studenta E^o Klub, Amruševa 5/I, 41000 Zagreb, Jugoslavio

2-4/11: **FLEJA-JEB SEMAJNFINO "junuloj kaj la krizo en Eŭropo"** + ludoj ktp proksime de Gent (Belgio); Rotizo ĝis 31/07: 650/750 FB; * Ilse Jacques, Molenstraat 29, B-2018 Antwerpen



PARTOPRENU!... PARTOPRENU!... PARTOPRENU!!!...

- 6-8/7: Somernokta Festo en EGELSBACH (FRG) (inter Frankfurt kaj Darmstadt)
Multaj jam kutimis al tiu aranĝo... neforgesebla!
30 GMK!... pagendaj al poŝtĝirkonto de germana Esperanta Junularo,
KARLSRUHE 545 77-754
Aliĝendas: Tini WOITE, An der Kirche 33, D-6115 MÜNster/Dieburg
Tel.: 06071-33568
- 27/8-3/9: SEMINARIO POR LINGVISTOJ en Centre Culturel international de
50210 CERISY-la-SALLE. Temo: "Le citoyen de demain et les langues"
La seminario estas organizata de APLV (Association des Professeurs de
Langues Vivantes). Estus bone se kelkaj esperantistaj fakuloj parto-
prenus. Informas (franclingve!): CCIC, 27, rue de Boulainvilliers
75016 PARIS
- 28-30/9: Seminario en KONSTANZ
(kun Germana E°-Instituto. Temo: Kontribuoj de E° por la celoj de
niaj lernejoj)
- 12-14/10: Lernsemajnfino en BLAUBEUREN (RFA)
Aliĝ.: E°-Verband Baden-Württemberg 8, Kolpingstr., D-7790 MESSKIRCH
- 26-28/10: Seminario: "El la praktiko por la praktiko!" (3a aranĝo samtema!)
Naturamika Domo D-7603 OPPENAU, Nigra Arbaro.
Aliĝ.: Margot Hektor, Fuchsmattstr. 23, D-7602 OBERKIRCH.
-
- 10-11/11: STAĜO DE PAROLATA ESPERANTO EN VILLERS-LES-NANCY (F) kun la fame
konata esperantista kantisto komponisto Max-Roy CARROUGES.... 
NEPRE ĈEESTINDA!!!!
Aliĝilo (ĉu franclingva, ĉu E°-lingva en ĉi-tiu bulteno!)

BONA KONSILO... GUSTUMU LA ETOSON DE LA K.C.E. (LA CHAUX-de-FONDS, Svisio)...

Kultura Centro Esperantista, kiu situas montare, flanke de la urbo, aranĝas E°-staĝojn dum la tuta jaro.

La instruado, kiun gvidas Stefano KELLER, efektiviĝas laŭ metodiko programita, aŭd-vida, per-gesta, paroliga kaj legiga. Dum unu semajno... studi matene... ferii la reston de la tago en amika etoso, jen io riĉiga lingve kaj kulture!

Por komencantoj: julio 15-20, aŭgusto 12-17 (paralele al seminario pri MODERNA CSEH-METODO)
septembro 2-7, septembro 23-28.

Por progresantoj: julio 22-27, aŭgusto 19-24, aŭgusto 26-31, septembro 9-14, sept. 16-21.
sept. 30-oktobro 5. KCE, PF 771, CH-La Chaux-de-Fonds, Svislando.

NIAJ MEMBROJ PRAKTIKAS ESPERANTO-N !!!

FAMILIA RENKONTIĜO EN ITALIO

Komence de aprilo nia tuta familio havis okazon partopreni familian renkontiĝon en la urbeto SAN SALVATORE proksime de CHIAVARI oriente de GENOVA en Italio.

Ni estis afable gastigitaj ĉe E°-familio Ges-oj FORMAGGIO en Chiavari, kiu prizorgis la tutan aranĝon de vendrede vespere ĝis lunde matene. En San Salvatore ni renkontiĝis ne nur kun E°-familioj venintaj el TORINO sed ankaŭ kun infanoj de du klasoj de la elementa lernejo. Ili eklernis E°n en la pasinta oktobro kaj jam povis iom paroli kun niaj gefiloj. Okazis programeroj por la infanoj: skeĉoj, ludoj, kantoj, muzikantaj klaŭnoj, vizito de baziliko, komuna vespermanĝo, ktp. Por la gepatroj de la gelernejanano estis aparta kunveno por prezenti E°n kaj ties taŭgecon ĉe instruado al infanoj. Krome ni prezentis diapozitivo-serion pri Japanio -nia vojaĝo en 1974- al la Ligura E°-Grupo, al la infanoj de tiu elementa lernejo kaj gepatroj, kaj fine ankaŭ al klaso de gimnazio, kie E° estas ankaŭ instruata.

Krom tiu ampleksa programo ni vizitis tre belan regionon, kie maro kaj montaro renkontiĝas kaj ofertas al la vizitantoj aparte belajn panoramojn. Bonvolemaj lokaj esperantistoj gvidis nin kaj montris al ni mirindajn lokjn, vilaĝetojn, havenetojn. En tute ni havis tre agrablan restadon.

A. GROSSMANN

TRIA "SEJNA" ESPERNATO-RENDEVUO

Pluraj Nanciaj klubanoj partoprenis la 3an seĝnan esperanto-rendevuon en MESNIL-ST-PERE apud Troyes, la 24an kaj la 25an de marto 1984. Ekde vendrede vespere, afablega akceptado de la ĉeestantaro okazis, kie ĉiuj ricevis kukojn kaj trinkaĵojn en la centro "Yvonne Martinot" (tiu Centro apartenas al la "Fédération des Oeuvres Laïques" de la departemento AUBE). La 85 partoprenintoj loĝis komforte en la apuda V.V.F. -"Villages-Vacances-Familles"-: Post la vendreda vespermanĝo, S-r° BABIN prezentis al ni la vivon de GRESILLON pere de lumbildoj.

Kvar kursoj funkciis: A, B2, B kaj C ekde sabate posttagmeze. En la kurso B2 ĉirkaŭ 20 homoj (progres-komencantoj), kiuj deziris perfektigi en la lingvo de Zamenhof, kolektiĝis. La "METODO 12" estis uzita de la kursgvidantino, S-in° TURIN. Bedaŭrinde la multnombra grupo ne favoris aktivan partoprenon de ĉiuj.

S-r° NANOVSKY, kunlaboranto de la Internacia Centro de la CHAUX-de-FONDS (Suisse) kaj profesoro pri lingvistiko, parolis en la kurso B pri la morfologio de Esperanto kaj ties perspektivoj. En la kurso C, S-r° SILFER, direktoro de "Literatura Foiro", prezentis al ni la fruktojn de sia 4-jara restado en Finnlando. Dank' al paneloj, lumbildoj, multnombraj libroj, kasedoj, li interese montris la similecon kaj malsimilecon inter Esperanto kaj la finna lingvo. Ankaŭ li sukcesis vekti intereson pri la finna kulturo.

Max-Roy-Carrouges, fama esperantista kantisto, pasigis al la ĉeestantaro agrablegan vesperon dank' al siaj diversaj poemoj kantoj.

Tiu riĉiga kaj bonege organizita restado plaĉis al ĉiuj klubanoj de NANCIO. Plej korajn dankojn al la grupo de TROYES, kaj eble, ĝis revido en la venonta rendevuo.

la Nancia E°-grupo



Ĝuu la neforgeseblan, venontan INTERNACIA-N ESPERANTO-SEMAJNO-N en NICO, sur la lazura marbordo!!!

DATO: de la 30a de marto 1985 ĝis la 6a de aprilo!

La investo (kaj la verŝajna plensukceso) postulas, ke aliĝoj alvenu antaŭ la 1a de oktobro 1984.

... Hotelo tute rezervita por esperantistoj! ... kvin divers-gradaj kursoj matene!
... Liberaĵ aŭ peraŭtobusaj ekskursoj posttagmeze!

Neimagebla kunestado en internacia etoso en la plej bela regiono de Francio!

Ĉe la aliĝo: ekpago 300 FF - (la tuta restado kostos de 900 FF ĝis 1750 FF)

NEPRE petu aliĝilon apud S-r^o LLORENS, "Hortensias 2", 121 bis, Bd Napoléon III, F-06200 NICE.

NOS MILITANTS NOUS ÉCRIVENT...

G. E. M. M. E.
Groupe ESPERANTO
6, Allée Marguerite
97158 MONTIGNY-LES-METZ
☎ (8) 765.47.51

17 et 18 mars 1984



Pour la première fois - cette année - la Municipalité de MONTIGNY-LES-METZ a organisé un Forum des Associations dont le thème était "Toute la Ville se parle". Une 60^{ème} d'associations, dont le G.E.M.M.E. (Groupe Esperanto) ont été invités à participer et ce fut un succès inattendu. Près de 3000 personnes ont visité les divers stands répartis dans tous les locaux de la M.P.T. Parc-Sanguier. Pourtant il y avait les fêtes du Carnaval à Metz...!

Malgré de disposer de plus de place, l'exposition sur l'Esp^{to} était installée au centre d'une grande salle du sous-sol, avec l'Union et les Scouts d'Europe, dont tous à vocation internationale.

Beaucoup de questions furent posées et même si les nombreux feuillets de "premier rendez-vous" ne nous reviennent pas, il est certain que du bon grain a été semé.

Des contacts et des discussions ont eu lieu, entre autres, avec des groupes de Scouts, de Guides, l'Association des Amis de R. Schuman, etc...

L'animation était surtout : à l'intérieur et à l'extérieur du bâtiment.

Notre filin "FIAT" est très amusant et il plaît. La série de diapos "L'Esp^{to} par l'image" est très intéressante = bon commentaire et belles images. Peu dire des panneaux d'exposition = ils sont parfaits et très complets et, ce qui ne gâche rien, très maniables.

Dimanche après-midi, un visiteur avouant 82 printemps s'est fait connaître comme "ancien esperantiste" d'Il y a environ 40 ans "Un bon âge, je n'envisage pas de m'y remettre".

En conclusion, le succès de ces 2 jours était tel que la Municipalité a l'intention de répéter peut-être même chaque année à pareille époque. A signaler aussi le Guide des Associations qui a été édité par le Rdm et dont 500 exemplaires ont été distribués.

Le succès rencontré tout particulièrement auprès de nombreuses R. TRIOLLE pour a assisté à l'inauguration et qui pendant plusieurs heures a été "Le Roi du Pop".
Retour à New Rochelle pour la collaboration aboutir à l'effacement et l'abandonner.
Et votre gratitude à New York, N. Davis et P. Collet.
L'année prochaine, nous serons déjà plus nombreux et ce sera deux événements réunis.
Pour le G.E.M.M.E.
Ronald NAY

Minaĵo-industrioj. Oni dragas sablon kaj gruzon granda-kvante, el la fundo de la riveroj MOSELLE, MEURTHE kaj VOLOGNE.

En la komunumo RAON-l'ETAPE oni ekspluatas porfiro- kaj granito-minojn. Oni ekstraktas gruzon, kiun la Administracio pri Pontoj kaj Soseoj uzas por fari makadamon. La grejso-minoj provizas la konstruado-entreprenojn per tiu materialo. La industrio pri granito troviĝas en la valoj de Moselotte, en Vagney. La laborejoj, instalitaj en VITTEL kaj en SENONES pli-daŭrigas belan metiistan tradicion.

Ekzistas metalurgia industrio, kiu tamen ne estas komparebla al tiu en la najbaraj regionoj apud NANCY kaj METZ. Sed ĝi estas inda je intereso. Tiu industrio, tre dissemita, funkcias en Vincey (feraj tuboj kaj velditaj feraĵoj), en Xertigny (drato-fabrikoj), en Charmes kaj rambervillers (meatalaj ĉarpentaĵoj), en Saint-Dié (drataĵoj, pceoj por aŭtomobiloj), en Gérardmer (profilitaj metalaj stangoj), en Epinal-Golbey (kaldronoj), en Raon-l'Etape (la uzino "Texrope"), en Remiremont (giso-fabriko), ktp. Kelkaj el tiuj uzinoj anstataŭis teksajn fabrikojn, fermitajn pro la krizo en la industrio.

Malgraŭ la industria depresio, kiu kaŭzis fermiĝon kak koncentradon de diversaj entreprenoj, la industrio pri teksaĵoj restas la sektoro la ple aktiva en LES VOSGES. Tiu industrio beligis ligi la loĝantarojn al la urbetoj en la XIXa jarcento. La malgrandiĝo de la nombro da loĝantoj en la kamparoj, kiu jam manifestis sin en la jaro 1810, iom rapide plu-daŭris. Al tiu natura dis-migrado de la loĝantaro, estas aldonata la nombro da Alzacanoj elmigrintaj el sia provinco kaj kiuj deziris resti Francoj post 1871.

La urbeto Saint-Dié havis 6000 loĝantojn en la jaro 1800. Naŭdek jarojn pli poste ĝi enhavis 17145 loĝantojn. Kompreneble la disvolviĝo de la industrio kongruas kun la moviĝado de la loĝantaro. La erao de la "granda industrio" datiĝas de post la milito de 1870. La akvo de la torento alportas mekanikan energion kaj ebligas blankigi la ŝtofojn; la humideco de la aero igas la fedenon esti malpli rompiĝema. La laboristaro estas abunda kaj malmulte kosta. Jules FERRY, naskiĝinta en Saint-Dié kaj Jules MELINE en Remiremont, kiuj ambaŭ estis membroj de la Francia Registaro, ege kontribuis al la ekspansio de la teksa industrio tie.

En la jaro 1857, la "fera vojo" atingis la urbon Epinal. En 1883 ĉiuj valoj estis pri-serveblaj fare de la fervojo; tio ebligis tiam pli bonan alvojigon de la produktoj: ŝtona karbo kaj koakso por la vaporokaldronoj; -la blanka karbo, t.e. la hidraŭlika energio, preskaŭ ne plu estas tie uzata-, kotono venanta el la haveno-urboj; fine la fervojo for-prenas la finitajn produktojn.

Turismo: la termo-fontoj kaj la turismo estas la du polusoj de sama aktiveco. LES VOSGES oferas apartan avantaĝon: tiu departemento posedas plurajn termo-terapiajn staciojn fame konatajn, kiuj estas ĉirkaŭataj de verdaĵoj ĉe la rando de belegaj arbaroj. Tiuj stacioj, posedantaj tre modernajn ekipaĵojn por sportoj, akceptas amason da terapio-bezonaj klientoj kaj turistoj; plie, multe-nombraj sportuloj iras tien por trejni sin antaŭ ĉampiona konkurso. La uzado de la mineralaj akvoj kiel medikamento kaj kiel dum-manĝa trinkaĵo okazigas ampleksan trafikon, precipe per plenaj vagonoj, eĉ per tutaj trajnoj. La aktiveco rilata al la termo-fontoj estigas, por LES VOSGES, centran punkton de la somera turismo. Sed, dank' al la neĝo, disvolviĝas nun ankaŭ forta vintra turismo. Ĉiuj stacioj klopodis por perfektigi sian hotelan ekipaĵon kaj siajn telferojn por skiantoj. La regiono de la lagoj el-logas multnombrajn tendumantojn; tiel, la municipoj iĝas maltrankvilaj pro la poluado de la akvo-surfacoj. Oni projektas instali akvodukton, al kiu ĉiu karavano povos esti al-ligata; kanaletoj verŝos la uzitan kavon en stacion por purigado sude de Gérardmer.


Tiuj turismaj aktivecoj prezentas por LES VOSGES gravan fonton de enspezoj, ĉar tiu industrio estigas kune kun la industrio pri teksaĵoj, unu el la ĉefaj ekonomikaj faktoroj de la departemento.

Krom tiu impona masivo da montoj -80 kilometrojn longa- tiel kaceptema al la turistoj kaj proponanta gamon da ekskursoj realigeblaj eĉ fare de ne tre postulemaj promenantoj, ekzistas nur malmultaj lokoj ne tre interesaj. tamen estas necese ankaŭ mencii kelkajn preĝejojn -kun arkitekturo laŭ stilo duone Rejnlanda, duone Burgonja- kaj malgrandajn romankajn preĝejojn. Kelkajn kilometrojn dis de Donrémy troviĝas la Galla-Romia pejzaĝo de GRAND; tie oni povas admiri belegan romian mozaikon, unikan en Francio, kiu povas rivali kun tiuj de Pompei kaj Piazza-Armenina en Sicilio. En la antikva epoko, GRAND estis grava civito; ĉar ĝi ne posedis eĉ unu rivereton, nur putoj -kiuj situis sub la amfiteatro- havigis la necesan akvon. Gravaj foiroj kaj festoj okazas en la departemento, inter aliaj: la rano-foiro en Vittel, la foiro pri tripo-kolbasoj en Val d'Ajol, ... por gefraŭloj en Vézelize, la festo pri jonkviloj en Gérardmer kaj la festo pri ĉerizoj en Bains-les-Bains.

*kompilis kaj tradukis Jean DEMISSY kaj
Yvette BRION*



distra [?] angelo



muzikinstrumentoj...

Enŝovu ilin en la kradon!

- harmoniumo-sakŝalmo
- vjolo-klaviceno
- klarneto-tamburo
- buglo-fluto-liro
- buŝharmoniko
- tamtamo
- piano
- harpo
- gitaro-liuto
- timbalo
- mandolino
- citro-gurdo
- tubjo-violono
- trumpeto
- akordiono
- gongo-flaĝoleto
- trombono-violonĉelo
- kontrabaso-aldo
- hobojo-banĵo
- ĉasokorno
- ksilofono
- fifro-ribeko
- ofiklejdo
- klariono


Tiun enigmon proponis por "LA INFORMILO" nia amiko J. DEMISSY el MONTMEDY (55)

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ ("La Informilo" n°45)

KRUCVORTENIGMO: interŝanĝi keiranto ulo topo rorkval iperit otuso ringo opulo serio bo akci aniz ĉi kaid alojo urno reostat io do or jelpi daŭr dorn kilo lev

SILABENIGMO: "Kio tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas".

BILDOKLARIGO: "Ne provu senkulpiĝi! ankaŭ mi spertis glacluvon!" (jen la kodo: a b c ĉ d e f g ĝ
a b c ĉ d e f g ĝ)



ANGUL-ENIGMO

(en ambaŭ direktoj!)

- 1 malgranda papera ujo
- 2 malsupera arma rangulo
- 3 medikamentvendejo
- 4 tuto, ĉiomo
- 5 organo de aŭdkapablo
- 6 glazurbriliga surkovraĵo (ĉerpita el
- 7 speco de angla biero "INSTRUA AMUZO" de
- 8 turisma oficejo /mll/ Marĉek-Markoviĉ. ĈSSR)
- 9 kemia simbolo de oksigeno